

Dumonata kultura informilo k esprimilo esperantista. 2,50 FF
N° 29 (47) - Oktobro 1980

ISSN 0150-5823



Eldonas : Cercle espérantiste de * Abono por unu jaro : 15 FF
l'Agenais, F 47340 LAROQUE * (12 FF por Francio)
Poŝtkonto : 3 371 74 M Bordeaux * al la ĉi-apuda pĉk.

ENHAVO

2. Esperanto-gramoj (Antoni Madej)
3. Niaj debatoj : Pri la organizo de la E-movado (II) :
(Nicole Déjean, Jakelino). Cu en Francio krei F.E.A ?
10. Respondo al Jakelino pri Mortpuno (-nn-)
12. La Jupo en Kofro (S. Suk)
16. Restado en Jugoslavlando (I) (G.Dumont)
20. Tra Eŭropo per fervojo kaj Esperanto (Jakelino)
23. Pli kaj plu pri "Organizo de la E-movado" (Ĵanseb)
24. La Revolucio (A. Panerai)
25. Nia felietono : Tra la mondo per biciklo (Alfa-Beta)
27. La danĝero pro la kuracado kaj la medikamentoj en psikiatrio.

En la koloraj paĝoj (I/IV), Esperanto-vivo en kelkaj lokoj, laŭ informoj senditaj de tieaj legant(in)oj:

- * La Pola Ora Aŭtuno (Jacqueline Lépeix)
- * Argelès sur Mer (Llech-Walter)
- * Amika Esperanto-Rondo Agenia (Kribo)
- * Ĝirondio (Girondia E-grupo)

Antoni Madej : "ESPERANTO-GRAMOJ"

Vivo

La prozo
de pozoj.

...

Dum tre longa tempo li fraŭlis
poste edziĝis kaj bedaŭris.

Atentu homamason

Tre ofte hommulto
Signifas sepulton !

Al E-instruisto

Se tre bela kursanino
Ekposedis vian animon,
Agu laŭ la jena taktiko :
En lit' klarigu gramatikon !

Plani

Bona laborplano
Necesas eĉ por amo.

Plej ofte...

... insignon de meritoj
ricevas emeritoj.

Simpla vivo

Dum tuta vivo
neniu lin laŭdis,
Mortis, - kaj ĉiuj aplaŭdis.

Geedzoj

Homa paro
por komparo.

Amconfeso

La ludo
de l'aludoj.

Eterna komencanto

Li estas sperta komencanto
dekkvin jarojn... lernas Esperanton.

NIA DEBATO

3

* Pri la organizo de la E-movado *
* II *

Sajnas, ke la deziro de ĉiuj esperantistoj estas, ke esperanto utilu al kiel eble plej multe da homoj, ne nur al tiuj, kiuj samopinias.

Nuntempe, esperanto estas ankoraŭ minoritata lingvo en la mondo. Necesas esperanto-aktivuloj por konigi esperanton, por promocii ĝin. Sed, laŭ mia opinio, oni trudas al si, varbante esperantistojn en ne "simpatia" medio. Esperanto estas komunikilo, kelkfoje la nura ligilo inter la esperantistoj. Nur pri lingvaj problemoj, pri varbado, instruado, eblas ke ili akordiĝu... Sed eĉ tio ne estas certa al mi, ĉar nia personeco ne povas, aŭ ne devus esti, "dispecigita" : Instrumetodo, varbado jam estas forte ligitaj al ideologiaj, politikaj sentoj, opinioj. Por-esperantaj agadoj estas forte ligitaj al per-esperantaj agadoj. Ŝajnas al mi ne akceptebla dispartigi tiujn du aspektojn.

Kio estus la enhavo de komuna gazeto ? Ĉu vere utilis al la evoluo de esperanto unuiĝo de la esperantistaro ? Ĉu tio estas realigebla ? realigenda ? Mi ne kapablas respondi : centralizita societo, societo de la Informatiko, ekzemple, eĉ "efika" (?), timigas min...

Por mi, pli gravas ekzisto de aktivaj esperantistoj, de vivaj asocioj, eĉ etaj, des pli bone diversaj, ol granda centra asocio, kiu aspektos nur kiel taktika strukturo artefarita por trudi akcepton ĉe mondskalaj aŭ naciaj instancoj. Federacio de esperanto-asocioj povus utili tiamaniere kaj organizi libroservojn en esperantaj kaj neesperantaj medioj, eldoni adresarojn, ktp...

Multnombraj asocioj esperantaj vere utilas al esperanto, kiam ili estas ne sektemaj sed toleremaj, kiam ili nur lojale konkurencas. La idealo estus, ke ĉiu povu trovi e-istojn en sia medio, ke ĉiu povu elekti E-asocieton por iĝi aktiva esperantisto, ke ekzisto de esperanto estu bone konata de la plejmulto.

Nicole Déjean.

Kiel Esperanto povas utili ?

Ne devus esti konfliktoj inter Esperanto-asocioj, se ĉiu el ili zorgus pri sia propra celo, ĉar asocioj, kiuj celas malsamon, ne povas rivali. Laŭ mia vidpunkto, la esperantistaro devus esti organizata laŭ tri niveloj :

* sur la unua nivelo, la asocioj, kiuj celas nur disvastigi Esperanton.

Frapas ĉiun sanan cerbon, ke tia celo ne povas esti la nura celo de Esperanto. Aserti tion estas tiom inteligente, kiom aserti, ke telefono ekzistas, por ke mi povu telefone klarigi al eskimo, kiel funkcias la telefonaparato. Tamen, telefoni al eskimo por diskuti kun li, kiel liberigi la laboristan klason, eblas nur, se iu zorgas pri konstruado, riparado, ktp, de la telefonaparatoj. Tial, asocio, kiu celas nur disvastigon de Esperanto, devas ekzisti, kaj estas ekskluzive celo de ĝi eldoni la vortarojn, lernolibrojn, ktp. Se reale UFE-anoj opinias, ke Zamenhof inventis E-on, por ke iu ajn homo povu komuniki al alia homo sian penson, do ja UFE devas eldoni lernolibrojn kaj vortarojn, por ke ne nur sed ankaŭ SAT-anoj povu esprimi sian penson en Esperanto. Ke SAT-Amikaro eldonas lernolibrojn, kiujn poste UFE uzas en siaj kursoj, ĉar ili estas bonaj, tio estas stulta. SAT-Amikaro povas organizi kunvenojn por diri al laboristoj, ke Esperanto taŭgas por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda, sed principe kursoj kaj materialo por ili estas tasko de UEA, ĉar, ĉu parolas Esperanton laboristo aŭ ĉefministro, la gramatikaj reguloj ja estas la samaj.

* sur la dua nivelo estas la asocioj, kiuj organizas diskutojn en Esperanto.

Tia asocio estas SAT, ĝi organizas diskutojn en E-o pri la taŭga vojo al la liberigado de la homaro. Sed se ĝi estas diskutejo, ĝi ne povas esti samtempe aganta. Ekzemple, se SAT-ano dirus : "Komparante faktojn kaj ideojn kun miaj gekamaradoj, mi trovis, ke la plej ĝusta vojo al la liberigado de la laborista klaso estas la komunista, do mi proponas, ke SAT

transformiĝu al asocio, kiu konkrete agadas, por ke la mondo fariĝu komunista", lin oni devus eksigi pro provo atenci kontraŭ la supertendenceco de la asocio. Same oni devus eksigi anarkiston, kiu celus, ke SAT fariĝu anarkista asocio, aŭ sennaciisto, kiu celus, ke SAT fariĝu sennaciista asocio. Ĉar principe SAT-individuo pensas memstare, la tuta asocio ne povas havi unu linion, kaj konsekvence ĝi ne agas. Supertendenceco estas la nura maniero, por ke SAT estu diskutejo, kaj tia diskutejo ja utilas, sed logike, kiam SAT-ano havas sufiĉe klaran ideon pri la vojo plej taŭga por la liberigado de la laborista klaso, li devas tiun vojon iri, kaj tiu vojo kondukas lin el SAT al io alia. Tamen la kamarado povas resti en SAT por tie klarigi al la aliaj, kiom taŭga estas la vojo trovita de li (kondiĉe, ke ĝin li ne trudu, nur prezentu), kaj samtempe agadi en alia asocio ol SAT. Tio ja estas la kazo de multaj SAT-anoj, kiuj aktivis en diversaj politikaj asocioj de siaj landoj aŭ de Esperantio.

Kompreneble, la vojo al liberigado de la laborista klaso ne estas la nura temo, pri kio esperantisto povas deziri diskuti. Oni povas krei asocion por diskuti, kio estas la plej bona maniero instrui ŝakon al infanoj. Principe katolika esperantisto ne rajtas, en la kadro de UEA, provi min konvinki, ke mi iru al la meso. Sed oni povas krei neneutralan asocion kie kristanoj, islamanoj, budhistoj, ateistoj kaj aliaj diskutos kune ĉu oni devas kredi al Dio, kaj se jes al kia dio, kaj kiel.

* la tria nivelo estas tiu de la asocioj, kiuj praktike utiligas Esperanton por iu ajn celo.

Ekzemple, asocio, kiu metas Esperanton al la servo de ekologio ; asocio, kiu volas kunigi la ŝakistojn de ĉiuj landoj por kune ŝakludi per Esperanto ; asocio, kiu celas kunigi homojn de diversaj rasoj por kune kanti en Esperanto la laŭdojn de Jesuo Kristo, ktp, ktp.

Mi opinias, ke esperantisto devas partopreni en la tri niveloj. Principe, ĉiuj devus esti en UEA, se UEA estas neŭtrala kaj zorgus nur pri disvastigado de Esperanto. Sed tio ne povas esti la nura agado de esperantisto, ĉar tio memorigas min pri spritaĵo : patrino diras al alia virino : "Mi estas tre maltrankvila pri mia infano, ĉar ĝi estas jam trijara kaj ankoraŭ ne scipovas paroli". Subite intervenas

la infaneto dirante : "Sed jes, panjo, paroli mi scipovas, sed ankoraŭ ne scias mi, kion diri." Nek estas tasko de OKK de UEA decidi, kiu salono de la kongresejo plej taŭgas por loki la meson.

La dua nivelo ne sufiĉas, ĉar se post diskuto mi trovas, ke io estas realigebla, do mi devas tion realigi, kaj ne nur pludiskuti pri la realigindeco de mia ideo.

Nur se estas atingita la tria nivelo, tiu de la konkreta agado, utilecon havas Esperanto, kaj kompreneble, nur se Esperanto utilas, indas ĝin lerni. Sed la tria nivelo ne povas esti atingita sen la aliaj. Ekzemple, se mi opinias, ke Esperanto devas utili al ekologio, unue mi devas disvastigi Esperanton, ĉar, se esperantisto post 40 jaroj restos nur mi, nur al mia spegulo mi povos paroli kaj ne al ekologiistoj. Kaj necesas ankaŭ, kiam mi estos forminta esperantistojn, ke mi parolu al ili pri ekologio, por ke tiuj, kiuj konsentos, agadu kun mi, kaj evidente mi povas konvinki nenium en asocio, kie jam la homoj pensas kiel mi kaj nur tial grupiĝas kun mi.


Do la tri niveloj nepre necesas, kaj partopreni en ĉiuj tri devus ĉiu logika esperantisto. Sed mi opinias, ke la tri niveloj postulas diversajn asociojn, kaj ke ĉiu asocio devas zorgi nur pri sia propra celo. UEA devas eldoni lernolibrojn, kaj ne organizi mesojn. SAT-Amikaro devas ne eldoni lernolibrojn, sed konvinki laboristojn, ke ili aĉetu lernolibrojn, kiujn eldonus UEA, kaj, sciante la lingvon, membriĝu ĉe SAT krom ĉe UEA. Kaj katolika Esperanto-asocio devas kanti la laŭdojn de la Dipatrino en Esperanto, sed ne instrui Esperanton al ĥorinfanoj, sed sendi ilin al UEA, kaj al SAT la laboristojn, kiuj iras al ĝia meso.

Tiel la Esperanto-movado estus racie organizita. Sed, tio ne povas perfekte okazi, ĉar :

- homoj estas nek raciaj nek perfektaj, kaj ĉiu volas, ke ĉiuj estu en la sama asocio, ekzemple, SAT-Amikaranoj volas, ke laboristoj lernu Esperanton nur ĉe SAT-Amikaro, kvankam la samajn regulojn ili lernus ĉe UFE, kaj UFE-anoj ne volas, ke laboristoj iru al SAT, ĉar ili kredas, ke SAT estas alia Esperanto-asocio, kio estas tute erara ideo.
- la duanivela asocio ekzistas ankaŭ por kapitalistaj ideoj : ja ekzistas internacia asocio, en kiu kapital-

istoj komparas faktojn kaj ideojn por trovi la plej taŭgan manieron malliberigi la laboristan klason, ĝi estas la tri-flanka asocio (en franca lingvo : trilatérale), sed nuntempe ĝi uzas la anglan lingvon por sia kapitalista celo. En la kadro de poresperanta kampanjo, UFE povus peti de mi, ke mi skribu al sinjoro Barre, ke li proponu al sinjoro Carter estonte diskuti pri ekspluatado de la laboristaro ne plu en angla lingvo, sed en Esperanto, ĉar li ne plu eltenas la lingvan diskriminacion, kiun Carter trudis al francaj kapitalistoj. Sed mi konfesas, ke tian leteron por la prospero de Esperanto mi nek emus, nek cetere scipovus redakti...

Jakelino.



Ĉ U en Francio krei

FRANCA n

ESPERANTO - ASOCIO n?

Jam de tre longe parto de la esperantistaro argumentas favore al kunfandiĝo de E-asocioj, en la landoj kie pluraj ekzistas. La 20an de junio 1979, S-ro Christian Bertin, el Rennes (Francio), dissendis al dudeko da francaj e-istoj kaj al pluraj E-asocioj plurpaĝan leteron, en kiu li celis "analizi la esperantan movadon en Francujo kaj konstati iujn faktojn kaj proponi solvon por rekresko de la prestiĝo de esperanto".

La red. de "Laŭte!" ricevis ekzempleron de tiu tre interesa cirkulero, fakte ne destinita al publikigo. Ne eblis represi ĝin en "Laŭte!", sed ĝi estis pridiskutita okaze de la E-semajno en Beauville (Lot-Garonio) somere de 1979. Ĉar la debato estis registrita, ni tiam povis sendi al C. Bertin la resumon de niaj tiamaj konkludoj per letero, kiun ĉiu el la partoprenintoj aprobis.

Malgraŭ la fakto, ke la legantaro de "Laŭte!" ne konas la enhavon de la cirkulero, jen la respondletero tiam verkita. Eble ĝi alportos elementojn en la studado de situacio efektive ekzistanta ne nur en Francio.

La ĉenletero iniciatita de Janseb - kiu ne ĉeestis en Beauville en 1979 - estis alia, nereakta sekvo en tiu debato.

Mi insistu, ke tiu letero sendita al C. Bertin spegulas nur la vidpunktojn de kelkaj personoj kune pridiskutintaj la aferon. Ĝi estu nur instigilo, por ke ĉiu plej atente esploru la problemon kaj agu - laŭ propraj konkludoj - tiel unuope sur loka nivelo, kiel interne de la propra asocio. Amen !

Kribo

.....

1979 08 03

Kara amiko !

Kelkaj geabonantoj de "Laŭte", partoprenantaj E-restadon en Beauville (47) de la 28a de julio ĝis la 3a de aŭgusto, leginte vian cirkuleron de la 20a de junio 1979, pridiskutis vian analizon kaj vian proponon pri la E-movado en Francio. Jen la rezultato de tiu pridiskutado :

* Ni opinias, ke, eĉ se ĝi estus ebla, la kreiĝo de F.E.A. kun la diversaj sekcioj UFE, SAT-Amikaro, FET, CNEO, ne alportus pli da prestiĝo al esperanto en nia lando. Pluraj personoj opinias male, ke la nova strukturo pligravigus la malbonan efikon de centralizo en Parizo, malprofite al malproksimaj provincaj regionoj - ekzemple Bretonio, Alzaco, Okcitanio.

* Tamen, ni ĉiuj same opinias pri la fakto, ke necesas pli da rilatoj inter la ekzistantaj asocioj por interŝanĝi informojn, kaj pli da kunlaboro ne nur ĉe la nacia nivelo, sed precipe ĉe la regiona. Ni dezirus ekzemple, ke la diversaj ekzistantaj asocioj interkonsentu por eldoni komunajn informfoliojn listigantajn ĉiujn asociojn, fakojn, libroservojn, ktp, ekzistantajn en Francio, kaj ankoraŭ pli detalajn informojn interne de ĉiu regiono (grupoj, kursoj...). Krome en ĉiu regiono necesus koni la adreson, kien sin turni por havi ĉiujn eblajn informojn pri la najbaraj regionoj, eĉ se ili estas translandlimaj (ekzemple, Alzacanoj devus scii, kien sin turni por havi rilatojn kun Badanoj, Svisoj, ktp).

* La ĉeestantoj ĝenerale substrekas sian emon al pli da "horizontalaj" rilatoj, al malcentralizo, prefere ol

al rilatoj inter la diversaj estraroj, kaj konstatas la mankon de komunaj adresaroj almenaŭ regionaj.

* Aliflanke, la ĉeestantoj opinias dezirinda la plimultiĝon de apartaj, fakaj, politikaj, profesiaj E-asocioj, kiuj nepre necesas por efike varbi en la koncernaj medioj.

* Ununura libroservo en Parizo ne favorus la librovendadon.

Multaj preferus bone provizatajn regionajn libroservojn, kien oni povus pli facile veturi por vidi kaj aĉeti la librojn, aŭ de kiuj oni povus pli rapide ricevi la pakojn.

* Same, ununura gazeto fontanta el Parizo prezentus malavantaĝojn. Nenio povas garantii, ke tiu gazeto havus kiel abonantaron la matematikan sumon de ĉiuj apartaj asocianaroj. (La kunfandiĝo de GEE ene de UFE ne plivigliĝis la instruitan fakon, male. Dume, la E-komisiono de ICEM per sia propra bulteno aspektas pli efika).

Oni aparte atentigas pri Alzaco, kie estas preferinde havi informojn kaj rilatojn kun la apudaj germanaj kaj svisaj esperantistoj ol ricevi dikan, certe multekostan kaj ne tre oportunan organon el Parizo.

* SAT-Amikaro fakte ne estas nacia asocio, sed franclingvia.

Iuj membroj de tiu asocio efektive povas peti la aranĝon de referendumo pri via propono, sed kiel aranĝi similan inter esperantistoj ne-membroj de E-asocio ? Kiel koni la adreson de tiaj esperantistoj ? Krome, ni dubas pri la agemo de ĉi-lastaj.

* Estas erara la aserto, ke Michel Duc Goninaz preskaŭ nur per esperanto bone vivtenas sin, gvidante kurson en la Universitato de Aix. Nia amiko Duc Goninaz efektive vivtenas sin tie kiel profesoro pri rusa lingvo. Li certe neniom ricevus, se li instruus nur esperanton !

Konklude, laŭ ni, por kiuj esperanto ne estas celo en si mem, por kiu necesus "venki", sed nur ilo utiligenda por plej diversaj celoj, pli efikas do pli intensaj regionaj interrilatoj kaj apartaj fakbultenoj laŭ afineco por pli efike varbi en la diversaj medioj, ol laŭnacia asocio/revuo, kiu(j), en la landoj, kie ili ekzistas, senteble kreskigis nek la prestiĝon de esperanto nek la amplekson de la E-movado. (La tuta nederlanda E-movado, ekzemple, tute ne kreskis pro la kunlaboro de la laborista asocio FLE kun la neŭtrala asocio en la kadro de "Komuna Bulteno", male).

Ni tamen opinias, ke estas tre utila la debato, kiun vi

iniciatis, ĉar ĝi levas problemojn, kiujn necesas malkaŝe kaj objektivite pritrakti, kaj espereble solvi, por la profito de ĉiuj - membroj aŭ nemembroj de E-asocio - do por la tuta afero.

En Beauville, la 3an de aŭgusto 1979.

.....
Red. Imagu, kiel ni laboregis en tiu E-restado en Beauville ! Des pli, ke tiam kaj tie estis lanĉita la unua ĉenletero ! Ha, fi al la klaĉemul(in)oj, kiuj primokas aŭ privipas la nenifaremon de sudanoj !

Ĉu somera E-semajno en Beauville, en 1981 ? Eble, jes. Ni informos pri tio en "Laŭte!".

Nia antaŭa debato :

 *
 *
 *
 *
 *
 *

R E S P O N D O al J A K E L I N O
 pri sia artikolo koncerne "Mortpuno"n.

Ni vivas nun en jaro 1980 post Kristo... Laŭ nia scio, la homa kaj prahoma speco ekzistis jam antaŭ 2 milionoj da jaroj, kun siaj tre primitivaj iloj. Ilin uzis ĝi por mortigi maljunajn bestojn, por manĝi ilin krudaj aŭ rostitaj, aŭ murdi najbaron, por rabi lian boaton, rezervon da manĝaĵo, aŭ por manĝi la najbaron mem, en espero aldoni la forton de la najbaro al si mem.

En tiu kondiĉaro de ekzistado ne ekzistis "justeco"... Antaŭ 20 000 ĝis 10 000 jaroj (epoko inter prahomaro kaj homaro), homoj vivis jam en grupoj kaj pensis, ke ekzistas "najbaroj" (kiel ili mem) en ĉielo, kapablaj sendi pluvon, kiam agrikulturo ĝin bezonas, sendi fulmon aŭ fajron, kiam oni ĝin bezonas, ktp.

Pro tiu kialo la homaro elektis inter si la plej spertajn homojn... la plej maljunajn, por sendi ilin en la montaron amikiĝi kun tiuj supozitaj najbaroj. La homaro en valo sendis ĉiam regule la dekonon de sia rikolto en la montaron, por prizorgado de tiu tasko.

Tiuj homoj en montaro - ni nomas ilin "pastraro" - trovis ĉiam novajn variojn de eblaj ĉielaj najbaroj (suno, milito, fiŝkapto, sano, ktp) kaj tiamaniere grandiĝis, de mil al mil jaroj, la nombro da serĉitaj najbaroj en ĉielo.

En la epoko de la egipta tempo estis proklamitaj proksimume 1000 ĉielaj "najbaroj" nomitaj "dioj".

Estas logike, ke tiu pastraro faris kodon de justeco (tranĉi manon de ŝtelisto, elŝiri langon de mensogulo, pendigi murdinton...). La pastraro kutimis tranĉi manon de ŝtelisto, ne ĉar li ŝtelis ŝafon, sed por ke la ŝafoj ne estu ŝtelotaj.

Dum jarmiloj evoluis homoj. Nun ili kreis vapormaŝinojn, elektrejojn, telegrafon, solidajn betonajn domojn kun centra hejtado, telefonon, aŭtomobilojn, subteran fervojon, unuvorte la hodiaŭan civilizan vivon.

Ĝis hodiaŭ la pastraro ne malkovris ĉielajn najbarojn por sendi pluvon aŭ sanon kiam oni ĝin bezonas, sed tenis firme sian pozicion de "makleristo" inter la popolo kaj supozita ĉiela najbaro. Kun la evoluo "demokratia" vento trafis la homaron, sen zorgi, ĉu la tuta homaro estas jam inda je tiu komforto, la demokratio.

La juĝista kasto tie kaj aliloke permesis ne mortpunigi murdinton, ne tranĉigi manon de ŝtelisto. La rezultato ? Neniu estas certa pri sia vivo. Ĉar se oni trovos murdinton, li ne estos mortigita kaj povos refari siajn krimegojn poste kaj poste...

La pasinteco nin lernigis, ke la malnova sistemo de laboro kaj punado (de vangofrapoj al la metilernanto ĝis la pendigado de murdinto, ktp) estas la nura kaj sola sistemo por malgrandigi la krimon kaj kuraĝigi la venontan evoluado de la homaro.

Aplikado de 25 frapoj ĉiutage al ĉiu kulpulo en malliberujo estus la plej bona malkriminaligo en nia hodiaŭa epoko, ...eĉ se nia demokrata "civilizacio" tion mallaudus...

-nn-

Red. En antaŭa bulteno anarkistoj aplombe prezentis sian konceptaron. Nun iom malsama tendenco aperas... Tiu kontribuo de -nn- havas almenaŭ unu meriton : ĝi liveras valoregan rimedon por progresigi la eternajn esperanto-balbutantojn. Mi sugestas 25 frapojn ĉiutage al ĉiu lingvofuŝanto. Tiel nia movado post kelka tempo rikoltos abundan provizon da zamenhofidoj ! Kaj la "red." de "Laŭte!" rapide transiros inter pli fidindajn manojn : mi preferas plu pigri, ol 25 matenajn frapojn !

La ĉi-sekva rakonto fontas el ĉina esperantisto, aŭto-
didakte lerninta nian lingvon, korespondanto de franca
amiko, kiu de tempo al tempo sendas al li fragmentojn de
"Laŭte!". Tiu eseo priskribas la nunan malfacilecon por
la ĉinaj virinoj reveni al okcidenta modo. La temo ja ne
estas tiel frivola kiel ĝi aspektas unuavide. Bonvenon al
S. Suk inter la kontribuantoj de "Laŭte!" !

S. Suk :

La Jupo en Kofro

Kun ŝvite malsekigita vesto kaj kvazaŭ oleo ŝmirita
vizaĝo, elirante el la kinejo post matineo, li sentas sin
refreŝigita en la aero. Sed alia spektaklo prezentata tuj
antaŭ liaj okuloj preskaŭ blindigus lin : la helegaj
radioj de la furioza sono, refraktitaj de moviĝanta
kolora homfluo, sur fono de dormantaj konstruaĵoj, dancas
antaŭ liaj okuloj. La varmega aero sufokas gorgon samkiel
en la kinejo.

- Akvon ! ekvokas li, serĉante trinkaĵvendejojn ĉirkaŭen.
Sed ĉiu trinkaĵbudo estas dense ĉirkaŭita de la soifantaj
spektintoj kaj preferinde estas trovi alian trinkejon.
Ekmemorante loĝejon de unu lia kolemino, kiu estas tre
proksime, li rapidas tien.

La pordo estas iomete malfermita.

- Ĉu estas persono ? vokas li ekstere kaj, ne atendante
respondon, forpuŝas la pordplaton.

Fremda svelta figuro kun helruĝa ĝisgenua jupo, aperanta
tuje antaŭ li, konsternas lin. Tamen lian improvizitan
pardonpeton anticipas konata agrabla voĉo :

- Jen vi, bonvenu. Kia vento enblovas vin ?

Jen lia ĉiutage renkontata kolemino Jufen. Ĉar li
neniam vidis ŝin, ĉiam pure kaj modeste ornamitan, vestiĝi
per jupo, ĉe ekvido li ne rekonis ŝin.

- Akvon, malvarman akvon, mi petas ! Mi soifmortus. Anhel-
ante, li diras.

Li bove trinkas kaj ŝi apude ridetas.

Apenaŭ reakirante la spiron, li scivoleme demandas :

- Ankaŭ vi aĉetis jupon ? Ĉu ankoraŭ nova ĝi ?

- Iomete eluzita.

- Ĉu vi akiris malnovan ?

- Ne. Ŝi honteme paŭzas momenton, poste kun mistera mieno
daŭrigas :

- Antaŭ kvar jaroj mi mem kudris ĝin, kiam mi ĵus abiturient-
iĝis el gimnazio.

- Kial mi neniam vidis vin portantan ĝin ?

Ŝi ekridetas, alproksimiĝante antaŭ ŝrankospegulo. Rotaci-
ante kun la okuloj kontraŭ la spegulo, ŝi explore demandas :

- Ĉu ĝi sidas al mi bonaspekte ? aŭ mallongas iomete pro mia
altokresko dum lastaj jaroj ?

- Tre bela ! Li prononcas la "bela" kun perpleksa tono, ĉar
dum tiom da jaroj menciante ĝin oni filozofis tuj ĝis "burga
vivmaniero", tial ĝi estis preskaŭ estinta evitinda vorto.
Sed li trovis nenium pli taŭgan ol ĝi. Ankaŭ ŝi ekruĝiĝis ĉe
la aŭdo de "bela".

- Ĝi estis de mi mem plej zorge kudrita vestaĵo. Ŝi iomete
fieras je sia metiarto. - Tamen mi portas ĝin nur en mia
hejmo kaj nur tiam, kiam en la ĉambro restas nur mi sola.

Ĵetante ŝercan rigardon al li, ŝi daŭrigas :

- Malbonŝance ĉifoje mi tiele estas trafita de vi. Ne disaŭd-
igu tion !

- Do vian kreaĵon aprecas nur vi sola mem. Kiom bedaŭre!
Tiel dirante, li ne kontentiĝas je si, kaj cerbumante momenton
li intencas eksciti ŝin :

- Ĉu virino kun jupo en publikejo ofendus juron ?

- Kompreneble, tute ne.

- Kial do vi ekstere ne portas jupon ?

- Vi strangulo ! Stranga demando ! Ĉar ili, kvankam ne intimaj
amikoj, estis ĉiam labore kaj forme tre respektaj unu al alia,
ŝi pensas, ŝi devas ĝentile respondi al li :

- Ke oni devas porti "revolucion" vestaĵon, vi ne scias ?

- Tio estis jam banala konvencio antaŭ 1976a jaro.

- Ne nur. Hodiaŭ estas ne malpli multe da maljunaj kadroj,
kiuj emas tiel admoni nin.

Li scias klare, ke ŝi estas malleĝera knabino, kaj ke
neniam oni atendu ŝin fari ian ajn sensacion. Tamen ŝi neeble
ĉiam kaŝas la virinan karakteron : granda emo beligi sin, kio
montriĝas, ke la konversacio povas daŭri plu. Trovinte pli-
bonan motivon, li redaŭrigas :

- Preskaŭ ĉiu juna heroino sur la ekranoj kaj scenoj de nia
lando lastdujare estis jam tute ornamita per tre gracia jupo.
Ĉu vi estis spektinta la filmon "Jen Tiu Familiaro" ?

- Ankaŭ "Ne Por Amo". Ŝia vizaĝo radias nur momenton. Tia

estas nur sur ekranoj kaj scenoj. Ŝia tono refalas en indiferentemo. - En reala vivo estas tute alia.

- Sed la prezentaĵoj certe donas jam ion, kvankam novan, tamen imiteblan.

La ĵus trinkita akvo, pro la nefluanta varma aero de ŝia ĉambro kaj la arda interparolo, ankoraŭ plue surverŝas lian vizaĝon per pli da ŝvitgutoj.

- Bondonu plu glason da malvarma akvo, li petas.

Ekokupante sin ŝi ĝemas : - Ho ve, boligita akvo estas varmega kaj malvarma - ne kuirita.

- Ne grave, malvarman donu. Ne kaŭzos malsanon tubokondukita akvo.

Ĉi-foje li malrapide suĉas, aliel ŝvitos terure, dirante : - Se mi estus virino, nepre mi portus la jupon. Plezure malvarmeta kaj elegante bela !

Eksplodas ĝoja rido en ŝia arĝenta voĉo, kaj li ĝoje daŭrigas :

- Ankaŭ kelkdek jaroj, kiel ni estis en iuj filmoj vidintaj, studentinoj de nia lando kutimis en nigra jupo kun blanka ĉemizo. Kiel nature kaj modeste belaj aspektis ili ! - li ĵetas rigardon al ŝia jupo - tiam, se iu studentino portus pantalonon similan al vira, ŝi ankaŭ hontus.

Kun granda intereso ŝi aŭskultas lian diron, fiksante sian rigardon ĉe lin.

- Se vi vestiĝos per la jupo, vi sentos plezure kaj aspektos pli bela - lia diro tamen proksimiĝas al la fino, kaj li demande rigardas ŝin.

- Tuj kiam plimulte da junulinoj portos la jupon, do mi certe ankaŭ - ruze respondas ŝi.

- Do ĝi ĉiam kuŝos en via kofro, ne servante al vi.

- Jes. Ja la jupo en kofro - ŝi ridetas.

- Interese kaj bedaŭre - li ekstaras. Dankon al via vivsava akvo kaj via sencoplana diro. Via ĉambro estas ankaŭ varma kaj mi devas serĉi alian rifuĝejon.

Adiaŭinte ŝin, li venas en la straton. Pro la ĵusa konversacio li rimarkas zorgeme la bildon de sur la strato. Kvankam en tia varmega ferio, preskaŭ ĉiu junulino anstataŭigis hieraŭan uniformon aŭ kitelon nur per modesta florĉemizo kaj glatigita pantalone el altkosta ŝtofo. Li ne povas bone kompreni, ĉu tiuj florantaj knabinoj ne

emas sin plibeligi per pli ĉarmaj ornamaĵoj aŭ ili jam el-lernis de siaj patrinoj modere abstini tiun emon por plaĉi al la socia fluo, kies temperamenton ilia antaŭgeneracio gustis jam ĝis la langoradiko.

Konscie li promenas en la ĉefa strato de tiu malgranda kaj homplena urbeto. Jam li estas rimarkinta, unu, du,...ne kalkulante infaninojn, ĝis kvar jupoportantojn, kiujn sekvas per rigardo junaj irantoj, admire, kaj inter kiuj ĉiu rapide trapasas homamasojn, kun terenfiksita rigardo, kvazaŭ honteme. Ĉe la sama tempo, kelkaj okulfrapuloj, kvazaŭ elteriĝinte, altiras al si konkure kun tiuj timemaj jupoportantaj knabinoj la rigardon de la publiko. Tamen ili estas nun tiuj, de la tuta urbanaro tre konataj pro siaj tre eksterordinara fasono kaj ĉie-ĉeestemo, kvar aŭ kvin junuloj, kiuj estis snobiĝintaj jam antaŭ du jaroj, imitante vivece la okcidentan vestmodon kaj samtempe plene blindiĝante kontraŭ la kompetenteco de ties popolo je scienco kaj tekniko, post projekcio de kelkaj filmoj de iuj antaŭkurantaj landoj.

- Tre interesa spektaklo, li pensas, direktante sin hejmen. Pravus Jufen. Eĉ se ŝi estus mia amatino, ankaŭ mi ne volus, ke ŝi pro sia jupo ekscitu scivolemon de la publiko. La jupo restu en kofro, plej prudente nun !

La 16an de julio de 1980.

S. Suk.

Ne plu stumblu ĉiam ĉe la samaj "malfacilaĵoj" !

En siaj "Lingvaj Anguloj", aperintaj en la bultenoj "Esperanto-Lernejo" kaj "SAT-Amikaro", nun arigitaj en aparta, etkosta broŝuro, F. Baronnet kolektis la plejoftajn erar-okazojn kaj donis klarigojn. Tiu 80-paĝa broŝuro estas ankoraŭ havebla ĉe La Juna Penso, F 47340 Laroque Timbaut, poŝtkonto 3 374 04 M

Bordx.

BARONNET

LINGVAJ ANGULOJ

7,20FF
kun
afranko

nur
kelk-
dekoj
da
ekz.!

RESTADO

G. Dumont

en Jugoslavlando - Julio 1980a

Lastan Januaron pro ekzemo mi pasigis 20 tagojn en Nyons'a malsanulejo. Dank'al kompetenta prizorgado de mia kuracisto kaj de malsanuleja personaro mi forlasis tiun lokon preskaŭ resaniĝinta. Tamen restis ankoraŭ kelkaj etaj infektitaj kovejoj. Por ilin elimini mi post interkonsento kun la kuracisto decidis traktigi ilin en specifa kuracejo pere de nature varma sulfura akvo. Tiucele mi petis de la Asekurkaso Porfervojistia devoligan pagilon de parto de la kostoj. Oni sendis al mi pagan devontigilon por sumo de 834 fr. por kuracadkostoj kaj helpo al pensionaj elspezoj. Samtempe mi skribis al de mi konataj kuracejoj por tiuj afekcioj kiaj Propiac, Digne, Gréoux, Les Fumades, Moligt kaj Uriage. Laŭ ricevitaj respondoj mi konstatis, ke la prezoj por plena pensio tage atingis inter 120-140 fr. krom en Uriage kie oni postulis 100 fr. Pri la kurackostoj oni silentis.

Plurfoje dum mia restado en Alĝerlando kaj poste el Franclando ankaŭ, - mi pasigis kelkajn semajnojn en Slovenio, en loko nomata Laško apud Celje, kaj eksciis pri ekzisto de pluraj banlokoj en tiu regiono. Pere de jugoslava samideano en Celje kaj de ties turisma agentejo mi turnis min laŭ liaj informoj kaj konsiloj al Atomske Toplice apud Podčetrtek, sur ĉefa strato al Maribor kaj Aŭstrolando. Oni informis min, ke 20-taga restado en tiu por tiuspeca afekcio ekipita hotelo kostos 18-20 Dol. tage t.e. 75 fr. Vojaĝoficejo informis min samtempe, ke 2a-klasa irbileto al Trieste kun 50%-a rabato sur franca teritorio kostos 127 fr. Mi do skribis al mia amiko kaj al hotelo por rezervi ĉambron. Oni akceptis min ekde la 29a de Junio. Ĉar ne plu necesas vizo al tiu lando, mi tuj povis alveturi. Per aŭtobuso mi ekveturis de Nyons la 27an, pagis 20 fr. ĝis Montélimar, kaptis la vagonaron kaj post ŝanĝo en Valence, Modane, Torino, Milano, Trieste, Zidani Most, Celje, mi atingis la cellokona la 28an vespere ĉ. la 22a horo, post duonhora piediro. Startinte la antaŭan tagon je la 6a matene, mi bezonis entute 40 horojn. En Zidani Most mi devis havi

ŝanĝon ; tamen, kune kun aliaj kunvojaĝantoj, ne vidinte la stacidomon pro ega longeco de la vagonaro, ni plu vojaĝis ĝis Dobova (29 km. for de Zagreb). Post 2 ½ horoj ni kaptis Diesel-motoran vagonaron reen al Zidani Most kaj Celje, mi ŝanĝis ankoraŭfoje kaj finfine alvenis al la jam dirita loko en indikitaj kondiĉoj. De Villa Opicina (itala-jugoslava landlimo) la vojaĝo kostis entute 750 lirojn kaj 213 dinarojn.

Oni tuj loĝigis min en 2-persona ĉambro, en kiu ankaŭ kundormis kroata inĝeniero. Ĝi ebligis eniri en alian, en kiu loĝis ankaŭ 2 feriantaj ministoj. Tiun ĉambron ni devis transiri por atingi la necesejon kaj lavejon. Post la vespermanĝo ĝis la 23a horo niaj gajaj kungastoj abunde provizataj per botelegoj da vino aĉetita ĉe najbara etfarmulo, kantis kaj ludis per akordiono malnovajn de ni ankaŭ konatajn kantojn ; vizitantaj junaj virinoj aŭdigis siajn belajn voĉojn ĝis kiam interseksa kunagado ĉesigis ilin. Kelkajn tagojn poste, foriris niaj kunuloj ministoj. Mi estis disigita de mia kundormanto kaj ricevis ĉambron por unuopulo ĉe la 4a etaĝo komforte meblita. Por ĝi mi pagis 505 din. tage anstataŭ 490 en la antaŭa por plena pensio kaj kuracado. Lavado de tolaĵo kostis ĉ. 40-50 din. semajne.

Post ekzameno fare de surloka kuracisto mi banis min ĉiutage en nature varma sulfura akvo, trinkis el ĝi dum 17 tagoj. La banado ampleksis 22 banojn entute. La kuracistaj ekzamenoj ĉe alveno kaj foriro kostis 300 din. = 45 fr. Mi ricevis atestilon pri kuracado : diagnozo, sanstato antaŭ kaj post la restado, fakturo de la sekretariejo de la hotelo, per kiu oni konigis al mi la pagotan sumon por 19-taga restado. Pro tio, ke mi pagis per ŝanĝebla valuto (fr.fr.) mi ricevis 10%an rabaton, t.e. 8487 din. + turista takso 154 din. + 300 din. (kuracista ekzameno) = 8941 din. Laŭ la kurzo 667,0168 din. por 100 fr.fr. Tiu sumo egalas al 1341 fr. La vojaĝkostoj tien kaj reen atingis 430 fr. De 1371 fr. la Asekurkaso retropagis al mi 471,93 fr. egalvaloranta 35% de la tutaj elspezoj.

La nutraĵo estis abunda kaj bongusta, el legomoj nekonservitaj ; ĉiu manĝo taga kaj vespera konsistis el supo, salato, viando en saŭco kaj deserto. Matene ni ricevis kafon aŭ teon laŭvole kun aŭ sen lakto kaj citrono, mielon, buteron kaj konfitaĵon. Dum du horoj, matene, tagmeze kaj vespere

daŭras la manĝoservo. La startrinkejo havas deĵoran servon de la 9a matene ĝis la 9a vespere. Unu taso da kafo kostas 9 din. kaj unu dl. da vino ankaŭ 9 din.

* * *

Podčetrtek estas vilaĝo kun ĉ. 100 enloĝantoj. Tie dekaj alveturadas dekduo da aŭtobusoj kaj 6-7 vagonaroj ambaŭdirekten tage. En hotelo disponeblaj estas tegmentita baseno kaj kabinoj kun varma sulfura ankaŭ trinkebla akvo en kiu povas gimnastiki la gastoj. En ĝi oni ankaŭ aplikas subakvajjn masaĝojn.

Cent metrojn for de la hotelo fluas rivero Sotla, disiganta Slovenion disde Kroatio. Fagaj kaj abiaj kovritaj montetoj, en la valoj herbejoj, kreskantaj viglaj terpomoj, maizo, fazeoloj kaj ceteraj plantoj ornamas la pejzaĝon. Ĉiu kamparana familio bredas 2 bovinojn, 1 aŭ 2 porkojn kaj kortobirdaron : ĝenerale kokojn kaj meleagrojn.

En la regiono preskaŭ ĉiuj homoj laboradas en uzinoj, konstruejoj kaj oficejoj ; vespere, dum sabatoj kaj dimanĉoj ili zorgas pri siaj kampoj, bestoj kaj dombirdoj. Vintre, ili ankaŭ faligas arbojn per hejtado de siaj hejmoj.

Eblas aĉeti ĝis 1000 kv. metrojn por konstruado de 3-4-ĉambra domo kaj posedo de apuda ĝardeno. Pruntomono de la ŝtato estas havebla (ĝis 30000-40000 din.) se oni pagas interezon de 1% aŭ 2% jare dum periodo de 10-15 jaroj. Se oni deziras konstrui pli ampleksan domon aŭ pligrandigi ĝin, oni rajtas pruntepreni monon laŭ interezo de 7% aŭ 8% retropagebla post 5 aŭ 6 jaroj. La lupago atingas monate 400-600 din.

Laboristo kun plej malaltŝtupa salajro ricevas monate 5000-6000 din., ministro 10000, vicdirektisto en banko ankaŭ 10000, sekretariino dulingva en hotela akceptejo, 6500. En apuda naĝejo kaj kampadeja restoracio eblas ricevi varman manĝon tagmeze kaj vespere ankaŭ el viando pagante 85 din. tagmeze kaj 60 vespere.

Prezo de kelkaj varoj laŭ kilogr. aŭ unuo :
Paprikoj, 50; tomatoj, 20-30; kukumoj, 20; ĉerizoj, 40; persikoj, 30-40; karotoj, 40; terpomoj, 10; elguŝigotaj fazeoloj, 30-40; cepoj, 25; 1 ovo, 3,40; 1 litro da vino, 38; bovaĵo, 110; porkaĵo, 115; sekala pano, 12; ŝafajon oni ne vendas ĉar en la regiono oni ne bredas ŝafojn. Vira kostumo kostas 2000-4400 din. ; unu ŝuparo, 400-800;

1 porvira ĉemizo, 247 ; transistor-radioricevilo kun pluraj ondolongoj, 1560 ; okulvitroj, 250-270 din.

Pensiulo loĝanta sur la kamparo diris al mi, ke li ricevas monatan pension da 3500 din. Li posedas propran domon, 5 hektarojn da grundo, 2 bovinojn, 2 porkojn, kortobirdaron kaj arbareton. Ĉiu terkulturisto (aŭ preskaŭ) rajtas iĝi kooperativano kaj are labori ; tamen plejparte preferas unuope zorgi pri siaj bestoj kaj kampoj. Ĝenerale ili disponas pri traktoreto por kulturado kaj 2 bovinoj kiel tirbestoj, bovidojn kaj lakton produktantaj.

Unu hektaro da grundo kostas laŭ kv.m. 20-40 din. Laŭ onidiroj nekontrolitaj eblas aĉeti ĝis 5 ha. Se la aĉetanto devontigas sin kreskigi por la ŝtato bezonatajn produktojn, li rajtas akiri 10 ha, plus 10-hektaran arbareton. Laŭ aliaj diroj la aĉetebla terareo ne estas limigita kaj oni povas lasi ĝin novala. Agrokulturajn produktojn la terkulturistoj vendas en kooperativoj aŭ en foiroj. En vendejoj la prezoj de ĉiuj artikoloj estas publike indikataj.

Multaj sovaĝaj bestoj, kiaj kapreoloj, leporoj, fazanoj, perdrikojn koturnoj, ursoj, priloĝas tiun landparton. Necesa ĉaspermeso valida dum du monatoj estas akirebla kontraŭ 2000-4000 din. Tiu lasta indiko ne povis esti kontrolita. Ĉasistojn akompanas gardistoj. La nombro da pafmortigitaj bestoj kaj birdoj estas limigita.

Apud Zalec, proksime al Celje, videblaj vastaj lupolejoj samkiel en Velenje regiono. Kotizoj por Socia Asekurkaso povas atingi ĝis 32% de la enspezoj. Kuracista ekzameno estas senpaga kaj kuracilojn oni aĉetas laŭ tre malalta tarifo.

Privataj aŭtomobiloj ne rajtas veturi dum 4 tagoj semajne; dimanĉe, neniuj. Tiu malpermeso ne koncernas eksterlandajn veturilojn, nek ŝarĝaŭtomobilojn kaj tiujn certigantajn prizorgadon de varoj por la loĝantaro kaj diversaj servoj kiaj militaj, policaj, sanitariaj, kc. Multnombraj aŭtobusoj kaj vagonaroj veturadas por certigi transporton de la vojaĝantoj. 1 litro da benzino kostas 19-21 din.

(daŭrigota)

G. Dumont
oktobro 1980a.

Ni provizore forlasu Jugoslavion kaj sekvu Jakelinon, prov-
antan eniri Pollandon. Jen nun nia "Pasintjara felietono" :

TRA EŬROPO per FERVOJO
kaj ESPERANTO ... (daŭrigo)

...
Iom antaŭ la deknua horo nokte, alvenis virinoj kun infanoj, kaj ili iris al la kajo. Mi ŝafece sekvis ; sed alvenis neniu trajno. Ni paciencie staris sub neĝofalo. Alvenis la biletisto, li petis ekskuzon, reprenis la bileton, kaj donis al mi 7 kronojn kaj bileton, kiu nun kostis nur 10 kronojn. Mi rigardis la bileton, kaj komprenis, kial li ne postulis pagon per kapitalista mono : la prezoj de internaciaj biletoj de Ĉeĥio al Polio estas skribitaj en rubloj. Ŝajne tiu kompatinda ĉeĥa fervojisto jam ne tre bone sciis, kiom da kronoj estas rublo, kaj li ne emis kalkuli, kiom da francaj frankoj valoras la 10 kronoj, kiujn oni devas pagi por veturi 30 kilometrojn meze de neĝa nokto.

Konklude : se iam vi bezonas internacian bileton por veturi interne de la socialisma paradizo, prefere aĉetu ĝin meze de nokto ĉe dormema fervojisto en ŝtatlima vilaĝeto, ol meze de tago ĉe kompetentaj oficistinoj en ĉefurba agentejo. Eble la fervojisto ne komprenus, ke pri 7 kronoj pli aŭ malpli mi neniel zorgas.

Post iom da atendado, alvenis la trajno kun duonhoro da malfruo pro la neĝoŝtormo. Ĉeĥo en uniformo kondukis la virinojn, la infanojn kaj min al la kupeo, kie li volis, ke ni sidu. Mi komencis prepari la paperojn. Post mallonga atendado, alvenis policisto kaj doganisto, kaj la kontrolo estis rapida. Ŝajne miaj kunulinoj, kiuj estis polinoj, estis kontrolataj pri la kvanto da mono, kiujn ili havis kun si, sed al mi oni lasis la kronojn, ĉar mi ne plu havis biletojn, kaj la ĉeĥoj ne kontrolis mian kapitalistan monon.

La trajno plu veturis, sed rapide haltis en la pola ŝtatlimstacidomo. Ni ankoraŭ atendis kaj, dum tiu tempo, mi preparis min por la formalajoj. Vidante en miaj polaj paperoj, ke estas deklaro pri la kvanto da kapitalista mono, kiun mi kunportas, mi ĉion eltiris el la monujo kaj, sub la miranta rigardo de miaj polaj kunulinoj, komencis nombri. Duone pro respekto al la pola leĝo, sed duone pro ironio, mi deklaras ĉion tre skrupule : kvankam mi havas pli ol mil francajn frankojn, mi skribas la ekzaktan nom-

bron, neglektante nur la centimojn, mi aldonas la 3 svisajn frankojn, kiujn neintence mi konservis en poŝo de post vizito al translima rejna urbo, kaj same skrupule nombras la ŝilingojn kaj la markojn. Alvenas la pola doganisto, ridema junulo, li blagas kun miaj kunulinoj, mi ne scias pri kio, sed videble pri tre humuraj aferoj. Kun granda rido li konsideras mian mondeklaron, kaj subskribas senkontrolite.

La pola leĝo permesas, ke mi lasu francan monon al polo, ĝi malpermesas, ke mi eliru el Polio kun pli da frankoj ol mi alvenis, sed verŝajne tiu juna pola doganisto ne imagas, ke povus esti polo sufiĉe freneza por donaci frankojn al franco. Tiom serioze li esploras mian valizon : polaj junuloj ne estas sufiĉe frenezaj por peni por ŝtato pli ol estas strikte necese por ricevi la salajron : li supozas, ke liaj slovakaj kolegoj pli klaskonscie faris sian laboron, kaj ne vidas, kion malpermesitan mi povus enkonduki de Ĉeĥo-Slovakio al Polio. Mi kredas, ke mi estas en ordo kun la pola dogano, sed aperas, ke ne : post momento alvenas doganisto multe malpli juna, tiom afabla, malpli gaja kaj supozeble pli galonita, kiu diras al mi en franca lingvo, ke mi devas eliri el la trajno por ŝanĝi monon sur la kajo. Mi miris, ke en tiom malgranda vilaĝo funkcias monŝanĝejo meze de la nokto, sed demandis nur, ĉu mi havas tempon antaŭ la foriro de la trajno. La doganisto respondis, ke restas 20 minutoj, kaj ke mi devas lin sekvi. Ĉar ne eblis diskuti, mi lasis la valizon en la trajno kaj prenis la mansakon, kaj sekvis. Mi baldaŭ konstatis, ke 20 minutoj estas pli, ol bezonas poloj por transformi francajn frankojn al zlotoj meze de nokto : la monŝanĝejo estis tute malgranda ĉambreto, kun tablo, malantaŭ kiu sidis virino, kaj antaŭ kiu staris pluraj araboj kun dolaroj (sed videble ili estis pli gastlaboristoj ol ŝtatestroj). La pola konsulo en Strasburgo donis al mi informilojn en franca lingvo, laŭ kiuj la deviga sumo por unu tago estas 12 dolaroj, t.e. 67 francaj frankoj. Tute certe la pola konsulo tre bone scias, ke en strasburgaj bankoj 12 dolaroj kostas multe malpli, kaj tute certe pro tiu scio li metis sur mian pasporton stampon, laŭ kiu mi ricevas restadpermeson en Polio por 9 tagoj kun kondiĉo, ke mi alportu al la Respubliko 67 frankojn tage. Kvankam tio estas skribita pole, tio estas klara kaj nediskutebla. Kiam mi estis en tiu konsulejo, junulino protestis kontraŭ la polaj reguloj pri mono, sed la vickonsulo klarigis,

ke la pola respubliko tion bezonas pro sia malriĉeco. Tial mi estis preparinta 603 frankojn en koverto. Miaj frankoj malaperis tiom rapide, kiom la dolaroj, en la kasojn bezonatajn por konstrui socialismon, kaj mi retrovis min kun pli ol 4000 zlotoj, t.e. jam sufiĉa riĉaĵo pola, ĉar polo bezonus unu monaton por ĝin elspezi, kaj mi, senpage gastigota, devis ĉion lasi en Pollando en limo de 9 tagoj. Jen kiel poloj ricevas mitajn ideojn pri la grandega riĉeco de laboristoj en kapitalistaj socioj.


Mi revenis al la trajno, devis trairi multajn vagonojn, ĝis mi retrovis mian kupeon, kaj revidante ĝin, konstatis, ke sidas pliaj virinoj. Unu el ili parolis la francan, kaj demandis min, ĉu mi iras al Varsovio. Iom mirigis ŝin mia respondo, ke mi iras al Kĉodzko, sed ŝi afable informis min, ke ankaŭ la juna doganisto iras al Kĉodzko, kaj ke li informos min, kiam mi devos eliri el la trajno. La polico alvenis, sed la stampo estis tiom rapida, ke mi ne aŭdacas nomi ĝin stampado. Tio montris al mi, ke ekzistas diferencoj inter la socialismaj landoj : la polojn ne interesas miaj politikaj ideoj, nek ĉu mi havas librojn en la valizo, ilin interesas unu afero, mia mono. Sed finfine, se nepre pagendaj estas tiuj 603 FF, mi preferas tiun manieron ol la kutiman kuradon en GDR aŭ Slovakio. Nun restis plu la vizito al la polico.

La trajno alvenis en la stacidomo de Kĉodzko je la oficiala horo, kaj kun feliĉo mi vidis, ke Eŭgeno ĉeestas. Li diris al mi, ke unue mi manĝu, ĉar nur post 2 horoj alvenos la trajneto, kiu iras al stacidomo 4 kilometrojn de lia vilaĝo. Li demandis, ĉu la kvar kilometrojn mi povos fari piede. Mi respondis, ke tion mi certe povos fari, se li portos la valizon, sed ke, se li iam invitos junulinon el Nîmes similan al iama amikino mia, li bone ŝin informu, ke tenisŝuoj ne estas pli adaptitaj en decembro al sudeta ol al aŭverna montaro.

(daŭrigota ankoraŭ kelkan tempon...)

Jakelino

Kian paciencon havas la gelegantoj ĉiam legi pri alies vojaĝoj, dum ili devas resti hejme, kultivante siajn laktukojn ! Jen kompanse kaj donace al ĉiu belan aŭtomobilon por pli facile sekvi la migremulojn tra la vasta mondo...



Pli kaj plu pri : "Organizo de la Esperanto-Movado"

Ĵanseb : Responde al Suzanne (*), mi provas klarigi kelkajn punktojn pri mia enkonduko (*).

"Esperanto" signifas du malsamajn aferojn : Lingvo kaj Movado. Sed en la penso de la publiko, la du estas ligitaj : La movado estas laŭ la bildo de la lingvo. Ni devas do prezenti imagbildon, kiu montras tion, kio VERE estas Esperanto.

Kiel konvinki iun, ke E. estas simpla, neŭtra, estonteca komunikilo por unuigi la homojn, se la movado aspektas tiom kompleksa kaj disigita ?

"Kial la revuoj devas esti belaspektaj ?" - Por diri al la neesperantistoj, ke E. ne estas la afero de kelkaj, sed de milionoj da aktivuloj. Se vi montras al iu nur revuetojn el kelkaj tajpitaj folioj, parolantaj nur pri kotizoj kaj asociaj problemoj, ili tuj pensos, ke Esperantistaro estas nur grupeto, kiu provas pluvivi. Male, kiam E. estas ligita kun konataj aferoj, ekz-e Assimil, Asteriks, ktp, tio pravas

(*) Vidu "Laŭte!" n-ro 28 !

ke ĝi jam sukcesas.

Mi tute ne konsentas pri la konkludo: "mi ne komprenas kial neesperantisto serĉus informojn en E-gazetoj". Fulmotondro! Ĉu esperantistoj havas nenion dirindan? Mi male estas kontenta, kiam mi povas montri al neesperantistoj E-artikolojn, kiuj interesas ilin!

- "Mi legis ĝin en E-revuo, vidu la artikolon!"

- Ha, estas en E., mi ne konas tiun lingvon...Ŝajnas simple, mi preskaŭ ĉion komprenas..."

Tio estas bona propagando. Ekzemple, kiam aperas informoj pri la nuna evoluo de Ĉinio en "El Popola Ĉinio" antaŭ ol en la francaj revuoj.

Do la bildo, kiun ni prezentas de E. estas la SOLA rimedo por komuniki kun tiuj, kiuj ne emas uzi sian tempon por legi aŭ aŭskulti niajn argumentojn. Ni ne rajtas preterlasi tiun taskon.

Janseb.

LA REVOLUCIO

Mi kredas al Socialismo por la Socialistoj kaj al Anarkismo por la Geanarkistoj kaj al Komunismo por la Gekomunistoj, kiel mi kredas ke ĉiuj aliaj sistemoj estas taŭgaj por la individuoj pretaj adopti ilin laŭ siaj naturaj inklinoj.

Por mi, estas fiziologie maleble, ke ĉiuj Unikuloj alvenos al la sama grado de disvolviĝo kaj en la sama tempo.

Neniam superos unika universala sistemo.

La opinio, ke ĉiuj povus akcepti ununuran sistemon estas forte aŭtoritateca kaj la geanarkistoj devus esti la unuaj por liberigi sin mem.

Diferencoj ekzistos ĉiam kaj ĉiam ili plimultiĝos laŭmezure kiel la homaro liberigi sin de la regateco bedaŭrinde ankoraŭ ekzistanta en preskaŭ ĉiuj individuoj.

Alessandro Panerai.

NIA FELIETONO

Antaŭ 50 jaroj... TRA LA MONDO

PER BICIKLO

kaj ESPERANTO

1an de septembro 1929

Mian vojaĝon pipras neatenditaĵoj! Hieraŭ, unuafoje depost mia alveno en Sovetio, mi estis arestita fare de fervoj-gardistoj. Jen kiel. Estis ĉ. la 15a, kiam mi atingis YURGA per la vojeto, kiu laŭas la trakon. La gardanto, anstataŭ akcepti min amike kiel kutime, kondukis min al la estro, kiu komprenigis al mi, ke mi devas esti gardata. Kaj li min enfermigis en ĉambro bone lumigata sed kies pordon gardis armita soldato. Je la 21a, trajno veturigis min al TAIGA, kie mi estis kondukita al la GPU-oficejo, kie oni enfermis min por la nokto en la klubsalono, sen manĝaĵo kaj sen trinkaĵo; kaj mi devis kuŝi sur la planko.

Vidante, ke mia enŝlosiĝo plu daŭris sen manĝo, sen trinko kaj sen ies vorto, mi decidis mem skribi al la poliestro por protesti. Samtempe mi skribis al esperantistoj, sed mi supozas ke tiuj neniam ricevis tiujn leterojn...

Fine, du tagojn poste, la poliestro alvokigis min al li kaj demandis nin, unue petante miajn legitimaĵojn. Li diris al mi, ke li esperas liberigi min en la vespero mem. Tio ja okazis je la 18a. Oni rekondukis min al la estro, kiu petis de mi en la rusa diversajn klarigojn. Tio estis dialogo inter surduloj, ĉar se mi balbutaĉas la ordinarajn vortojn, mi ne kapablas konversacii en la rusa. Mi tamen komprenis, laŭ lia sinteno, ke li ekskuzas sin. Miavice mi petis klarigojn. Li respondis, ke antaŭhieraŭ voĵgardistino telefonis al li, ke nekonato trairis ponton sur la fervojo kaj ke tiu nekonato estas strange ekipita kun durada maŝino, nudaj kruroj, ktp, ktp. Tiu individuo eliris el la arbaro kaj revenis en ĝin trairinte la ponton.

La leganto bonvolu konscii, ke ni ĉiam estis en revolucia kaj ... milita periodo. Krome la afero okazis en tute virga arbaro de ĉiam infestita de ĉiuspecaj koboldoj, banditoj kaj nun sabotistoj. Mia trairado estis tiel stranga, tiel neatendita, ke la emocio de tiu kompatinda kamparanino estas bone komprenbla. Fine, estis tiu fama malpermeso ruliĝi sur la reloj.

Ĉiuj ĉi detaloj postulis de tiu kompatinda adjutanto posten-estro pli da telefonado en du tagoj, ol de antaŭ du jaroj. Evidentiĝis, ke mi ne ruliĝis sur la reloj. Mia aparato troviĝis en stacio MARIINSK. Atestaĵo tion pruvis. Tiel, nenio plu devigis, ke oni gardu min ; oni do liberigis min kun ekskuzoj kaj donacante al mi bonan manĝon. Krome oni proponis al mi veturi al MARIINSK per trajno senpage...

Dimanĉon 13an de oktobro 1929

Jam de 4 aŭ 5 tagoj mi estas en IRKUTSK. Min gastigas familio M., kiu praktike estas esperantista. Jen la surprizoj, kiuj atendis min en IRKUTSK :

- 1)Neniu letero alvenis.
- 2)Perdiĝis la pakaĵo el miaj vintraj vestoj, kiun mi tien sendis.
- 3)La franca ambasado en Moskvo informas min pri la neeblo akiri vizon por Manĉurio, do por Ĉinio. Spite tion, mi juĝas bona iri ĝis ĈITA kaj tie vintri.
- 4)La klopodoj, kiujn mi devas fari en IRKUTSK, estas des pli malfacilaj, ke latentas milito en Manĉurio.

Feliĉe, ankaŭ tie ĉi aparte bone helpas min la esperantistaj kamaradoj de la ege vigla klubo el junaj studentoj, kies estro estas S-ro N. Jam ili sukcesis liverigi al mi alian permesilon por ruliĝi sur la reloj.

Merkredon 16an de oktobro 1929. Lago Bajkalo.

Por trabicikli 8-12 kilometrojn estis vera ekspedicio ! Ni trairas la fervojan ponton super Angora kun speciala permesilo kaj atingas la klubon de INOKIENSK je ĉ. la 18a. Same kiel hieraŭ, amaso da gejunuloj atendas kaj aklamas min, kiam mi alvenas. La kunvenejo plenpleniĝas, ankaŭ kun multaj plenkreskaj fervojistoj, kaj fine de la kunveno oni febre aĉetas miajn kartojn. Kvaronhoron la homamaso akklamadas kaj akompanas nin ĝis la stacikajo por mia pertrajna ekiro rande de Bajkalo al la stacio de SLUDIANK, kiu troviĝas trans tunelaro ĉe la okcidenta elirejo de la lago.

Tie mi retrovas mian aparaton kaj povas plu ruliĝi sur la reloj. Malofte mi vidis tiel belajn panoramojn...!

(pluruliĝonta)

Alfa-Beta

Por scipovantoj de la franca !

*
* La danĝero pro la kuracado kaj la medikamentoj *
* en psikiatrio. *

De 4 jaroj, G.I.A. (Grupoj por Informado pri Aziloj) en Parizo (Medikamenta Komisiono) kaj Tuluzo, kolektas kaj pri-traktas grandan kvanton da informoj pri tiu problemo. Dank' al la bonvolemo de "psikiatriataj" kaj al la komuna dokumentaro el ĉiuj, G.I.A. nun povas prezenti sufiĉe gravan dosieron, vivecan kaj diversaspektan, kiu lume klarigas la real-econ de tiuj danĝeroj tute ligitaj kun la tuta danĝero de la "psikiatria universo".

La ĉefa parto konsistos el atestoj (pli ol 40 partoprenantoj), kies verdiremo kaj dolora pripenso tute transpasas la universitatan paroladon. Tamen oni konsideris necesa paroli detale pri la tuta kuracado kaj pri la medikamentoj laŭ la medicina vidpunkto (klasika kaj kritika). Aŭtonomeco kaj defendo fronte al la psikiatroj neprigas klaran kaj objektivan informon.

Aldonaj ĉapitroj pri-traktas la "psikiatran skemon", la kuracadojn antaŭe uzitajn, sed ankoraŭ eblajn, la publikajn tekstojn pri la defendo, ankaŭ pripensigajn tekstojn kaj diversajn pritemajn tabelojn.

Tiu dosiero el 80 paĝoj (larĝa formato) estas preta por la eldonado. La dato dependas nur de financaj problemoj. Necesas inter 10 000 kaj 20 000 FF por plenumi la laboron (7 000 por la tajpado) kaj oni devas antaŭvidi du monatojn da prokrasto por la apero.

Ĉiu el vi povas persone decidi pri la apero de tiu broŝuro helpante laŭ pluraj manieroj :

- * antaŭmendi ... ekzemplerojn je la prezo 20 FF
- * pruntedoni aŭ mem doni monon.

Oni povas peti informojn je la jena adreso :

Mise à Pied, B.P. 2038, 31018 TOULOUSE

Laŭ la Tuluza G.I.A., komunikis

J.G.

*
* la venonta numero de "Laŭte!" aperos meze de novembro *
*

Directeur de publication : Simonet. * Commission paritaire *
Imprimeur : Baudé, F 47340 Lercque. * n° 58 651.

E-VIVO

La Pola Ora Aŭtuno

Jam je la 16a fojo okazis de la 2a ĝis la 15a de septembro 1980 Internacia Esperantista Feriado en ĉarma vilaĝo de la polaj Sudetoj, Miedzygórze, kiu proponas al la feriantoj sian puran aeron, siajn abiojn, sian naturparkon kun akvofalo kaj sian sportan vojon por konservado de la sano.

Bedaŭrinde, ĉi-jare, pro la situacio en Pollando, la porcio de alilandanoj ne estis granda. Tamen venis du italoj, du francinoj, tri gesamideanoj de GDR, 4 gebulgaroj, 1 slovako, kelkaj ĉeĥoj kaj kelkaj geukrajnanoj. La multaj ĉeestantoj loĝis en diversaj lignaj domoj sur la sanatoria strato. En la plej granda, domo Gigant, okazis la Esperanto-kursoj. Polaj komencantoj povis eklerni la internacian lingvon. Pli lertaj lernantoj povis partopreni en konversacia kurso. Okazis ankaŭ kurso pri tradukado inter la pola lingvo kaj Esperanto. Por la preskaŭperfektaj esperantistoj el pluraj nacioj okazis seminario, kie ili povis interŝanĝi opiniojn kaj spertojn pri Esperanto. Tiun seminarion tre interesigis ukraina samideano, kiu demonstris la instrumetodon de pastro Ĉe, kiun li persone konis. Estis ankaŭ personaj atestoj pri Edmond Privat. Krome, ĉiuj povis retroviĝi por kune lerni kantojn en Esperanto.

En domo Gigant okazis ankaŭ multaj distroj. La feriantoj rivalis per imago por la "balo de ĉifomuloj", kie aperis plej diversaj kostumoj. Gajnis la unuan premion la sorĉistino sur balailo, antaŭ la vampirinoj de la sabatvespero. La alilandanoj prezentis humuraĵojn kaj kantojn de siaj landoj. Cimbalkoncerto estis enkondukita per legado de eltiraĵo el la E-traduko de epopeo "Sinjoro Tadeo". Okazis vespero de virina poezio en Esperanto. Ensemblo el Kłodzko venis kanti en Esperanto. La muzikensemblo de la montarsoldatoj de Kłodzko bele kantis en pola lingvo pri sia preteco heroe defendi la limojn de la patrolando, kaj estis varmege aplaudata de la ĉeestantaro. Profesia aktorino unuafoje montris spektaklon en Esperanto pri Roza, Klara kaj Lidja Zamenhof, kaj ankaŭ amuzan hindan legendon pri "deveno de virino" (kaj de edzo!). Tiel oni ne havis tempon por enui.

En la preĝejo de la vilaĝo, du mesoj en Esperanto donis

al katolikoj de diversaj landoj la okazon danki al la Di-patrino pro la ĝoja etoso en Pollando.

Krom mallonga promeno en Miedzygórze, okazis pieda ekskurso al ĝardeno ornamita per lignaj statuoj reprezentantaj fabelojn, kaj al la pilgrimejo de Maria Neĝa, kiu estas barokstila preĝejo sur alta monto, al kiu iam grimpis la papo, kiam li ankoraŭ ne papestis. Aŭtobusa ekskurso kondukis la feriantojn al pluraj terbanejaj urbetoj, inter kiuj unu, kie iam vivis Chopin. Ili vizitis ankoraŭ vilaĝon Wambierzyce, kun ĝia granda preĝejo kaj ĝiaj krucvojoj statuoj. Bedaŭrinde, pro la malbona vetero dum la dua semajno, nur la sanaj kuraĝuloj povis partopreni la piedan ralion al monto Śnieżnik, ĉe la ĉeĥa limo. Sed la mikrobligatoj povis interŝanĝi Esperanto-insignojn, aŭ partopreni ŝakturniron.

Malgraŭ la malmulteco de la alilandanoj, tiu internacia feriado tamen ebligis interesajn kontaktojn, pri kiuj tre ĝojas la ĉeestintoj.

Raportis Jacqueline Lépeix.

Pikniko en Argelès sur Mer (24.08.80)


Renato Llech-Walter invitis la esperantistojn de la regiono pikniki en la ĝardeno de sia vilao "Sunradio", 38, boulevard de la Mer, 66700 Argelès sur Mer.

Partoprenis dudek gesamideanoj inter kiuj ges-roj Lloancy, profesoroj en Pau.

Llech-Walter donacis al ĉiuj la "sangria" por akriigi la apetitojn kaj la kafon kun konjako por bone digesti. S-ro Lagoutte donacis grandan kukon, kiu ĝojigis la frandemulojn.

Ricevis diplomojn de la Franca Esperanto-Instituto : S-inoj Noguier, Payret, Malchrowicz kaj S-roj Fernandez, Van Gestel, Testas, Gérard Charles, lernantoj de Llech-Walter, Boumal kaj Abecassis.

La ĵurnalo "Midi-Libre" fotis kaj raportis, okaze de tio oni sukcesis varbi turistojn, kiu laboras en Parizo ĉe "Journal Officiel" kaj alian turistojn, kiu forlasis la movadon. Post "skuado" de la federacia prezidanto, li promesis realiĝi al niaj esperantistaj organizoj.



Kunveno de Amika Esperanto-Rondo Aĝenia en Laroque-Timbaut

15 personoj (4 el apudaj departementoj) ĉeestis la 27an de septembro en Laroque. La ĉefa afero - anstataŭigo de Jako Simonet, ekde estis solvita jene :

La nova komitato de AERA konsistas el : H. Benaïm (prezidanto), R. Chassard (vicprezidanto), J.C. Gionco (sekretario), C. Baudé (kasisto), G. Roux (membro).

C. Baudé estas la nova leĝa respondeculo de "Laŭte!" ekde 1981. La adreso kaj poŝtkonto de AERA (la ĝis nun uzata) estas komuna al tri aferoj : AERA, Laŭte kaj broŝurservo de SAT, sed, kompreneble ĉiu afero restos sendependa de la aliaj kaj konservos apartan kontlibron.

La libroservo de la grupo troviĝas nun en Laroque-Timbaut. Venonta aktiveco : neniu proponis informkunvenon ie, sed kursoj plu okazos en Tonneins, Monflanquin kaj Villeneuve sur Lot. Krome funkcias la perkoresponda kurso gvidata de Ĝermena.

Ni fiksas nenian daton por venonta kunveno. Ĝiam neceso helpe por la bulteno aŭ por la broŝuroj en Laroque, la tiea eldonanto povos alvoki en "Laŭte!".

Fine de la kunveno, sed, bedaŭrinde, post foriro de kelkaj ĉeestintoj, Nicole kaj Ginette prezentis la Larzakan aferon per belaj kaj trafaj diapozitivoj kaj E-komentoj, kiujn ili antaŭe registris sur kasedo. Gratulojn pro tiu bonega kontribuo !

* *
*

La morgaŭon, 28an de sept., kelkaj AERA-anoj havis la okazon retrovi en GOLFECH - meze de densa kontraŭatomcentrala renkontiĝo - relative multajn E-geamikojn, kvazaŭ rendevue, kvankam "Laŭte!" - aperinta fine de aŭgusto - ne alvokis por tiu evento (kio iom kolerigis nian surlokan k-dinon Roza).

Kribo

Ĝirondio

Sabaton, la 18an de oktobro, okazos publika informkunveno en EYSINES, de la 15a ĝis la 17a.
Adreso : Centre aéré du Pinsan, avenue René Antoune
(sagetoj "route du Médoc").

"Société Toulousaine d'Espéranto" invitas :

Dimanĉe, la 26an de Oktobro, okazos en Carcassonne renkontiĝo inter la regionaj gesamideanoj. Ni ĉiuj rendevuos antaŭ la ĉefa pordo de la "Cité de Carcassonne" (Porte Narbonnaise) je la 11a matene. Loko estas antaŭvidita. Oni povos kunporti sian manĝon.

~~~~~ Vortoj de la nova kasisto ~~~~~

Kiel de nun pagi por "Laŭte!" kaj la broŝurservo :

Ununura adreso : Cercle espérantiste de l'Agenais  
F 47340 Laroque Timbaut

Ununura poŝtkonto : (je la ĉi-supra adreso)

n-ro 3 371 74 M Bordeaux

Sur la bankĉekoj menciis : Cercle espérantiste de l'Agenais (nepre ne "Baudé").

Ĉiam indiki sur la ĝirkupono aŭ per letereto la celon de la ĝiro aŭ de la ĉeko :

- \* abono al "Laŭte!" : "Laŭte 1 jaro"
- \* broŝurmendo : "3 DI + 2 LA" , ktp...
- \* provizo por la broŝurkonto : "BS-provizo"
- \* donaco : "... por Laŭte" "...por la BS".

La abono al "Laŭte!" povas komenciĝi je iu ajn momento en la jaro. Ĝi validas unu jaron ekde la unua sendita numero kaj inkluzivas la "adresaro"n. Se oni sendas pli ol necese, tiam indiki la celon de la kroma sumo (donaco, dujara abono, duobla abono - t.e. por ricevi 2 ekzemplerojn, ktp).  
Nepagipovaj landoj : eble estas solvo por pagi la abonon (kontraŭ E-literaturo, filatelioj, ktp), skribi pri tio al ni. Kribo.